EKO 2021
Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013
2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj
Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-55 sendita el Budapeŝto la 15an de decembro

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Nova komisiono por AMO

Spite la senduban valoron de komisiono por sproni la emociajn aspektojn de homaj rilatoj ene de familioj nunaj kaj starigotaj, eĉ ene de la esperantistaro. Tamen ne pri tio temas, sed pri Aktivula Maturigo, la programo de UEA lanĉita fine de 2013 kiu ĵus atingis la okazigon de 80 seminarioj en ĉ. 35 landoj. Tre gravas, ke AMO akiru novajn aktivajn laborfortojn, kiu interalie prizorgu sian pluvivon de ĝia unua generacio al la dua. Jen la ekde nunaj membroj de la komisiono, kaj UEA donis al la estrarano pri AMO la rajton aprobi novajn komisionanojn. Jen la refonda konsisto:



**Marija Beloŝeviĉ**, Kroatio: Organizis la sukcesan AMO 78. Havas bonegajn kontaktojn ene de la katolika mondo (IKUE). Havas fortajn ligojn kun la artisma, kultura mondo. Laboras movade tra jardekoj, ankaŭ en ILEI, kiel ĝia sekretario.



**Małgosia Komarnicka**, Pollando: Organizis ĉiujare AMO-seminariojn kadre de la agado en Vroclavo pere de la Eŭropa Centra de Interkultura Edukado, kaj Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kanto, kiu organizas la festivalojn – jam okazis la naŭa. Havas bonajn rilatojn kun la Universitato en Vroclavo kaj aliaj instancoj.



**Michela Concialdi,** Italio: Membro de la antaŭa komisiono, kiu esprimis deziron pluagi en la nova. Okupiĝas pri trejnado de kadruloj, havas rilatojn kun TEJO. Italio troviĝas inter la landoj, kiuj gastigis la plej grandan nombron da seminarioj, depost la 4a en 2014.

### *Ofice:*



**Jeremie Sabiyumva**, la estrarano en UEA respondeca pri AMO. Membro de la Afrika Komisiono, kunstrebanto por Universala Kongreso en Afriko.



**Stefan MacGill**, la patro en la ludo, kun bona kontaktado tra la centra Eŭropo kaj prizorganto de EKO-komunikoj, grava mesaĝilo por AMO.

En la unua EKO-komuniko de 2022, ni anoncos la tiaman staton de la planoj por intensa programo de seminarioj tra tiu jaro.

# VERDEN: nova EU-projekto pri Daŭripovo kaj Transporto, kunordigata de UEA

Ĵus finiĝis en Parmo (Italio) la unua projekta kunsido de VERDEN, nova projekto financata de Eŭropa Unio (EU) kaj kunordigata de Universala Esperanto-Asocio.

Daŭripoveco estas grava temo en la nuntempa socio, kiun UEA jam plurfoje traktis, ekzemple kadre de Universalaj Kongresoj (UK) kaj fakaj eventoj. La Asocio kunordigis la pretigadon de la faka Gvidlibro pri la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo de Unuiĝintaj Nacioj, aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA kaj elŝutebla el la retejo de la laborgrupo Esperanto por UN. En 2019 UEA ankaŭ starigis novan fondaĵon, Klimato, por kompensi karbon-emision pro la okazigo de UK-oj (uea.org/alighoj/donacoj/co2).

La projekto VERDEN okazas kunlabore kun Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), faka asocio aliĝinta al UEA, kaj Biciklista Esperantista Movado Internacia (BEMI), faka sekcio de TEJO, kun la subteno de Parma Esperanto-Grupo kaj Flandra Esperanto-Ligo. Ĝi fokusiĝas pri internacia kunlaboro pri daŭripoveco kaj transporto. Efektive, la franca filio de IFEF okazigas kunsidon pri la temo, kun subteno de EU, en aprilo 2022, kaj estas jam konsentite, ke la AMO-programo kontribuos al tio per seminario ene de la programo: la franca sekcio de IFEF okazigos subvenciatan kunsidon en la kulturcentro Greziljono en aprilo 1-5.

**Duncan Charters**, prezidanto de UEA, komentas: "*Ni tre ĝojas, ke UEA kunordigas tiun ĉi gravan projekton, subtene al siaj aliĝintaj asocioj. Estas la unua EU-financata partnera projekto de UEA kaj ni diligente laboros por konkretaj rezultoj*". **Rodica Todor**, prezidantino de IFEF, aldonas: "*La reloj ligas la landojn, la ideoj la homojn. Persiste ni atingis belan partneran projekton de pluraj E-asocioj, kies kunlaboradon ni jam ekĝojas*". **Lars Sözüer**, ĝenerala sekretario de BEMI, komentas: "*Ni celas kunlabori kun aliaj asocioj ekster Esperantujo kaj aparte esplori la temon pri biciklo-transporto en trajnoj*".

VERDEN celas antaŭenigi verdajn daŭripovajn kutimojn kaj de la alia uzi nian verdan lingvon kaj montri, ke per Esperanto eblas trakti seriozajn temojn kaj havi signifan efikon. "*Nia unua statuta celo estas disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo*

*Esperanto. Tiu ĉi faka projekto instigas nian movadon kunlabori pri tre grava temo kaj sekve kuraĝigas nin aliri la eksteran mondon, gazetaron, aliajn organizaĵojn, politikistojn kaj montri la rezultojn de internacia kunlaborado per Esperanto*", komentas **Francesco Maurelli**, kiu kunordigas la projekton nome de UEA. Celo de la projekto estas pretigi manlibron kun konkretaj, uzeblaj konsiloj por organizantoj.

Kadre de la sama subvenciprogramo Germana Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Nederland ankaŭ komencis alian EU-financatan partneran projekton kun fokuso pri daŭripoveco, pro kio UEA gratulas al siaj du landaj asocioj.

## Inda rezulto en Rumonge, Burundo




La programo RITE ludis signifan rolon en perreta eduka trejnado. Tion organizas <edukado.net> kun kiu ILEI havas partnerajn rilatojn jam de jaroj. Kune ili evoluigis programon por instruista maturigo. La postuloj estas signifaj, ĝis nun nur 5 personoj sukcesis – du el ili en Burundo. Tio okazis en 2019.en ekzamena sesio okazigita surloke de ILEI. Jen la sukcesintoj nun ricevis siajn atestilojn. EKO gratulas!

https://eo.wikipedia.org/wiki/Rumonge

## Internaciaj lecionoj el Krakovo

Fine de oktobro 2021 okazis du (senpagaj) internaciaj Esperanto-lecionoj de la Jagelona Universitato (la sama leciono, realigita en du grupoj). Partoprenis ilin esperantistoj el landoj de Eŭropo, Centra kaj Suda Ameriko.La aktivaĵoj komenciĝis en la tagoj antaŭantaj la lecionon.

La unua etapo: **ekzerco "Detektivoj"**
Rekonstruo de la cirkonstancoj. La partoprenantoj estis detektivoj. Ili spektis filmeton, en kiu estis montrita la interno de reale ekzistanta malnova, kamparana domo, forlasita subite, antaŭ kelkaj jaroj. Vestaĵoj en ŝranko, iloj por labori, objektoj por ĉiutaga uzado, bokaloj kun konservitaj nutraĵoj, lito malaranĝita, kovrita de memoraĵoj kaj de diversaj objektoj. La tasko de la partoprenantoj-detektivoj estis esplori, laŭ la videblaĵoj, pri la cirkonstancoj de forlaso de tiu domo, pri la loĝinto(j) k.s. Ĉiu detektivo invitis al la tasko du kundetektivojn-konsilantojn kaj okazis inter ili reala interagadoj. La komunikado estis realigita nur en Esperanto. Fine, la detektivo formulis skribe sian supozon pri la cirkonstancoj. **Aŭtenta komunikado**. Lernado per kunagado estas pli nova formo de la komunika metodo.

La dua etapo: **la leciono**
La verkitaj de la partoprenantoj tekstoj konsistigis la lingvan materialon de la leciono mem, bazon por korektado de entekstaj eraroj kaj por ĉia necesa eksplikado. La laboro okazis kun aktiva partopreno de la lernantaj personoj.

La ekzerco venas el la programo de 5-monata kurso (jan.-majo 2021), dum kiu la partoprenantoj faris pli vastan, plenan version de la ekzerco. La kursaro sekvas la gvidon de la projekto EAQUALS de la Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj) de la Konsilio de Eŭropo
Freŝa informo: eblas aliĝi al kursoj - https://bit.ly/37MIYye
(aŭ https://docs.google.com/document/d/1JvimMeNl-nc3VJhi44f6NjbzDuaZvepiVRl0BYdEW5c/preview)

Maria Majerczak, la kursgvidantino, Jagelona Universitato




## La mara juro

Internacia Jurista Esperanto-Asocio (https://www.esperantojuro.org/, jurista@esperanto.ac) ofertas kurson pri Internacia Mar-juro. Vidu je https://www.esperantojuro.org/kursoj/ .

Roland Rotsaert

## Tago de Homaj rajtoj festita

Kiam Hector Hodler fondis UEA, homaj rajtoj formis parton de la internaciista tagordo de la Asocio: Hodler forte kredis je toleremo, egaleco (inkluzive de genra egaleco) kaj pacaj rilatoj inter nacioj kaj konsideris Esperanton ilo por realigi tiujn idealojn.

Bonvenon legi la mesaĝon de UEA pri la Tago de Homaj Rajtoj, la 10-a de decembro ĉe https://uea.org/gk/999.

========= vortoj: 1070 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperi **17a aŭgusto 2021** (per EKO 2021-34). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

**Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

ILEI

**Helpantoj:**
Rob Moerbeek
Gbeglo Koffi
François
Lo Jacomo

**ENHAVO**

- AMO-komisiono
- VERDEN - ekologio
- Rumonge elstaras
- Kursoj el Krakovo
- Homrajta afiŝo